



## **NORDHUNGARIA INFORMO**

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo  
Miskolc*

Januar<sup>o</sup>-februaro 2010-a

## Enhavo

NOVJARA TOSTO DE LA PREZIDANTO DE UEA .....	3
NOVJARO .....	4
Konkurso de goblen-brodantoj .....	4
Mortis la dirigento Mura Péter .....	5
Foiro de antikvaĵoj .....	6
D-ro Ferenc Jáki estas naŭdekjara .....	7
Himno al Semo .....	8
JOHANO FORTA .....	8
Memortabulo inaŭgurita honore al doktoro Kálmán Kalocsay, medicina profesoro .....	13
Csokonai Vitéz Mihály .....	14
AMKANTO AL LA ĈEVALIDFELA BOTELO .....	15
Saĝaj pensoj .....	16
Legindaĵoj .....	16
Libro-raraĵoj .....	17
Muzeo „Herman Ottó” .....	17
La Muzeo Herman Ottó .....	18
Ŝercoj .....	19
Vort-enigmo .....	20
Leteroj de niaj legantoj .....	21
„46-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET- 46)” .....	23
La granda rusa komponisto .....	26
Gratuloj .....	29

## NOVJARA TOSTO DE LA PREZIDANTO DE UEA

Karaj kuntostantoj al la postjubilea nova jaro!

Ni tostas hodiaŭ al nia dokumenta lingvo. Kiam (la en 2009 jubileinta) Lazaro Ludoviko Zamenhof kunmarŝis kun ni sur la valon de la homa egaldigno en 1887, li kreis dokumentan lingvon. Ĝian ĉifron vi povas paki en absurde malpezan broŝureton, en 'ŝlosilon'. Se vi volas, vi povas eĉ sendi dokumenton al homo, kiu ne lernos la lingvon, sed nur devos deĉifri per sialingva ŝlosilo vian dokumenton.

Hodiaŭ ni tostas al nia monumenta lingvo. Kiam (la en 2009 kunjubileinta) Ivo Lapenna grimpis por ni la monton de Montevideo en 1954, la movado gvidata de li sentis la bezonon pruvi sian lingvon kapabla konstrui monumentojn, kapabla ĉiufake funkcii same delikate, same precize, kiel aliaj kandidatoj por la rolo de interŝtata lingvo.

Ni hodiaŭ tostas al lingvo, kiu laboras ponte inter tiuj du skaloj. Neniu lingvo malpli supra povus porti tiel delikatan devaron, ekde simpla dokumenteco, pere de majesta monumenteco, ĝis la respondeco ponti inter la simplemo kaj la majestemo.

Tostas ni hodiaŭ al tiuj, kies inspireco faris el la lingvo personan spertaron disdirenadan ankaŭ al tiuj niaj najbaroj, kiuj ne lernis ĝin. UEA lanĉas por la ekanta jardeko Projekton Vizaĝoj – ne malplej per tiu ĉi mesaĝo – kiu spronu vin verki dokumentojn, skulpti monumentojn, por diskonatigi krom Zamenhof kaj Lapenna ankaŭ la multajn prirakontindajn vizaĝojn de la Esperanta mondo. "Vivos eterne pri ili memor!" nur se aperos pri ili materialo biografia – aŭ, se vi preferas, viv-libr-a – vikipedie, foirbude, volumege, broŝurete, do en la tuta bunto de nia repertuaro. Lande, fake, loke, eĉ eksterasocie, kunvizaĝumu kun ni!

Probal Dasgupta

Prezidanto de UEA

Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 355

2010-01-01



## NOVJARO

Mi salutas niajn karajn legantojn, nome de la Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos” en Miskolc kaj mi deziras en bonaj rezultoj riĉan, pacan ĝojplenan novan jaron.

La unuan numeron de nia revuo mi proponas al via atento, en kiu ni prezentas la plej novajn eventojn de nia 801-jara urbo, ĉar ni vivante ĉi tie, ĝiaj ĝojoj kaj malĝojoj estas ankaŭ la niaj. Komence de la nova jaro ni ofte demandadas: kion portos la nova jaro? Ĉu estos sufiĉe da pano sur la tablo de ĉiuj homoj? Ĉu nia urbestro povos doni pli da laborejoj al la loĝantoj? Ĉu restas la jam ekzistantaj laborlokoj?

Tre gravaj, suferigaj demandoj estas ĉi tiuj. Ja ekde la ŝanĝiĝo de la politika reĝimo, la plimulto de la homoj atendis, ke en nian landon finfine ensalutos la t.n. ”okcidenta bonhavo, pli alta vivnivelo. Sed ni devas konfesi, ke dum jaroj de la socialismo, kontraŭ la ĉi tie anoncita okcidenta abundo, ni, hungaroj vivis malabunde, kvankam ni havis ĉion necesan, ĉi tien kalkulante la aŭtomobilon, loĝejon, semajnfinan domon kun ĝardeno, eksterlandajn vojaĝojn, ĉe la pli malriĉaj popoltavoloj: la ĉiutagan necesan nutraĵon, loĝ,- kaj laborlokon, eĉ ankaŭ la ekde tiam ne por ĉia avantaĝo ŝanĝiĝintan kulturen vivon kaj ankaŭ la pli favoran sanitaran provizadon. Kiel ekde la politika ŝanĝiĝo, ankaŭ nun ni plenplenas per atendado. Ĉu mildiĝos iom la ekonomia krizo? Ĉu la ĉi-jare elektota nova politika reĝimo kapablos mildigi la zorgojn, aŭ ĉio restas malnovstate kaj plej bonŝance ne okazos plua malboniĝo?

Ni ĉiuj esperas pli belan kaj bonan jaron de la 2009-a, sed ankaŭ tion ni esperas, ke la 2010-a ne estos pli malbona de la antaŭa. Saman ni esperas en la agado I de nia Hungaria Esperanto-Asocio. Ni atendas de la estraro de nia lando, urbo kaj de nia Esperanto-lingvon parolanta landa organizaĵo, ke super ilia forto ili faru ĉion eblan por la prospero, pli bona vivo de ni ĉiuj. Al tiu laboro ni deziras al ili: forton, sanon kaj bonajn kunlaborantojn.

S-rino Adri Pásztor

### Konkurso de goblen-brodantoj

La Nord-hungaria „Asocio por Bodrogkisfalud” anoncis konkurson por goblenbrodantoj kaj ekspozicion de goblenoj,- ni informiĝis el la nro LXVI/2a de la tagĵurnalo Norda Hungario. Al la konkurso la organizantoj atendas parte jam pretajn manlaboraĵojn, aliparte la ĵurio prijuĝos ankaŭ nebroditajn modelojn. Infanoj, plenkreskuloj povas konkursi.

La deveno de la ornamcelaj brodaĵoj perdiĝas en la malhelo de la pasinto, sed eble ili povas esti samaĝaj kiel la invento de la kudrilo. Ornama brodaĵo estas ankaŭ la gobleno. Ĝis nun mi vidis goblenbildojn imitantaj pentraĵojn de iuj famaj hungaraj pentroartistoj, ornamkusenojn, murbildojn preparitajn per tiu ĉi kudrotekniko. Majstra laboraĵo estis ĉiuj. Grandmezurajn murbildojn mi vidis kaj kiel ornamon de ornamaj vestaĵoj de genobeluloj, ekspozicie prezentitaj en kasteloj en Aŭstrio, Pollando, Slovakio kaj Hungario. Ĝenerale idilajn pejzaĝojn, florajn-naturbildojn eternigis tiamaniere la zorgemaj manoj sur la murbildoj. En nia patrujo en la 19-a jarcento komenciĝis la pli grandskala preparo de la goblen-brodaĵoj. Tiu ĉi estas teksafeske egalsurfaca brodaĵmaniero, kio elformiĝis samtempe per la ĉesigo de teksado de la grandmezuraj kaj tre laborpostulaj drapiraĵoj, ĉirkaŭ je ties anstataŭigo, laŭ la burĝaj-etburĝaj bezonoj. Oni preparas ĝin ĝenerale per lanaj, silkaj, aŭ per molaj brodfadenoj. La goblenbrodaĵo konstatas ĝenerale el samdirekto kliniĝantaj tiel dense kudritaj duon-krucmaŝoj, kiuj transprenas ĉiun faskan fadenkruciĝon de la kanavas-ŝtofo. Mia patrino preparis kudrante ĝin, progresante de maldekstro dekstren, kaj ŝi aplikis tiom da kudriloj, kiom da fadenoj ŝi laboris. Ŝi instruis ankaŭ tiun ĉi brodmanieron inter la aliaj belaj brodaĵfaradoj de la Karpat-baseno, kaj nature ni devas kalkuli al ili ankaŭ la tn: „sinjoran-

brodadon (nobelan brodadon)”. Mi estimdonas al la inicianto de tiu ĉi konkurso kaj mi deziras multe da sukcesoj al ĉiu partoprenanto de la konkurso kaj ekspozicio.

En la 1220- jara ĉarto ni povas legi unue pri la ekzisto de la setlejo. Sed tiutempe ĝi estis menciita ne ĉinome, kaj ni povas diri, ke ĝia nomo dum la jarcentoj multfoje ŝanĝiĝis. La vilaĝo nun apartenas al la fama vinregiono „Tokaj-Montosubo.” Al urbo Tokaj, ĝia distanco estas nur 6 kilometroj. Ĝi estas atingebla ankaŭ per fervojo sur la linio Miskolc-Sátoraljaújhely. Ĝia fervoja stacio nomiĝas Bodrogkeresztúr, sed tamen la haltejo estas sur teritorio de Bodrogkişfalud. La setlejo rigardas al la ebenaĵaj regionoj, sed la norde etendiĝantaj arbaroj donas agrablan ripozlokon kaj al homoj kaj al bestoj. Al la surfaca faŭno apartenas la t.n grandaj ĉasbestoj: la damaoj, aproj kaj muflonoj. La marĉajn lagojn de la Trans-Bodrogriveraj teritorioj; oni prikalkulas kiel paradizon de akvobirdoj kaj fiŝkaptistoj. La regiona domo en la vilaĝo estas vizitebla post antaŭa tempokonfirmigo. Por la vizitanto la konstruaĵo prezentas la malnovan kaj la nuntempan vivon de la setleja loĝantaro. La vilaĝanoj kore atendas ĉiujn interesiĝantojn por rigardi la riĉan ekspozicion.



Gobleno (expressz.hu)

### **Mortis la dirigento Mura Péter /1924-2009/**

La 4-an de januaro 2010 la tagĵurnalo „Norda Hungario” informis nin laŭ la Hungara Inform-Agentejo (MTI) pri la morto de la fama dirigento Petro Mura. Li naskiĝis en Budapeŝto la 21-an de junio 1924. Siajn studojn li faris inter 1932 kaj 1945 en la pianista fakultato de la budapeŝta „Liszt Ferenc” (Francisko List) Muzikarta Altlernejo, en 1943-1944 en la Nacia Muziklernejo, kie liaj majstroj estis Kadosa Pál kaj Ferencsik János (Paŭlo Kadoŝa kaj Johano Ferencik). Petro Mura agadis inter 1942-1944 kiel opero-korepetitoro. Li estis korepetitoro de la Hungara Ŝtata Operejo: inter 1945 kaj 1950. Inter 1953 kaj 1957 li estis la muzikdirektoro de la Nacia Teatro de Miskolc, kie li organizis la societon de operkantistoj. En 1957-1958 li estis dirigento de la Silezia Ŝtata Opero de Bytom, kaj profesoro de la Muzikakademio de urbo Katowice (en Pollando). En 1961 en mia urbo Miŝkolc, li fondis la Simfonian Orkestron, ĝis 1984 li estis ĝia direktor-dirigento, inter 1984 kaj 1987 li estis dirigento de Operdomo (en Budapeŝto), ekde 1986 li estis profesoro de la hungara Muzikakademio. Li estis „Grandmerita Artisto” kaj premiita per ordeno „Liszt Ferenc”.

La lasta verko de Petro Mura estis: la traduko de unu operraraĵo: Don Giovanni de Giuseppe Gazzaniga; la finekzamena ludado de operfakaj studentoj de la „Liszt Ferenc” Muzikarta Universitato. La finekzamena ludado oni aranĝis la 19-an de decembro 2009 – diris la mortfamon sciiganta historiistino s-rino Magda Horák, kiu estis en ĉiutaga kontakto kun la dirigento, dum ŝi serĉadis la artistakciojn de la Landa Hungara Izraelita Publika Societo.



Nacia Teatro en Miŝkolc

### **Foiro de antikvaĵoj**

Ekde la pasinta somero mi atentadas la akciajn foirojn de antikvaĵoj, okazantaj sur la ĉefstrato Széchenyi (sechenji) en urbo Miskolc. Mi kutimas rigardi tiujn, ĉar po fojoj oni povas rigardi multe da belaj pentraĵoj, tapiŝoj, libroj, porcelan- kaj aliaj objektoj. Mia patro pentris pentraĵojn, mia patrino arte brodis. Ankaŭ mi alte taksas la artajn, belajn objektojn. Sed mi scivoleme rigardadas ankaŭ la artajn antikvaĵojn, ja ĉi oni prezentas por la aĉetantoj aŭ por la nur gapi volantoj; la karakterizajn ĉiutagajn objektojn de niaj geavoj, gepatroj. Troveblas ĉi tie tre malnovaj kaj pli novaj valoraj libroj, eĉ por mi nevaloraj literaturaĵoj. Ja, la ĉi tie rigardeblaj libroj servas ĉies guston. Sed inter la alispecaj objektoj ekzistas ekzemple ankaŭ vestaĵglatiloj funkciantaj ne per la nun jam konata elektroforto, sed per bruligita lignokarbo, krom la malnovaj ŝuoj, lampoj... Dum nia pasintjara en julio okazinta ekskurso en Francujo, kiam ni vizitis niajn tie vivantajn parencojn, ili akompanis nin al iu tiea antikvaĵofoiro en iun vilaĝon. En la setlejo ĉirkaŭita de montoj de Alpoj, ni povis same admiri la tieajn malnovajn, antikvajn objektojn. Al tiu foiro la plej karakteriza fakto estis la alta taksado de la gebovojn de la lando. Ja, ili bredas la gebovojn ne nur pro ilia viando, sed ĉefe pro la lakto, ĉar pli ol 600 fromaĝspeciojn produktas Francio. La fromaĝoj estas diversgustaj kaj laŭ la specifoj ankaŭ la prezoj estas ankaŭ diversaj. Inter ili ekzistas malmultekostaj tamen tre bongustaj, sed ekzistas por mi ne aĉeteblaj pro iliaj altaj kostoj. Sed, ĉar ankaŭ en Francio oni ne pretigas la barilon el kolbaso (ne ĉiuj estas riĉaj homoj), niaj parencoj aĉetis por ni la multekostajn fromaĝojn nur gustumi, kaj el la pli malaltajprezaj plie. Ekzemple la fromaĝoj de la Beaufort fromaĝenterreno estas tre bongustaj, kaj tamen pageblaj por ni. Mi ne pensis pli frue, sed spertis, ke pro la menciita stato, la prezo de la viandaĵo de gebovoj tre multekostas en Francio, duoble alta ol en Hungario. Dum la foiro, sed ankaŭ la setlejaj butikoj plen-plenis per tiuj objektoj, kiuj montris bildojn de gebovoj. Krome interesa estis antaŭ mi ankaŭ la granda kvanto de jungilaro tre bele ornamita kaj pli modestaj por la ĉevaloj kaj por la gebovoj, kaj kaproj, ŝafoj, sonoriloj. Tiujn ni jam ne povas rigardi sur la foiroj de niaj departamentaj foiroj. Ni, nun prezentas kelkajn fotojn pri objektoj de la foiro en francuja setlejo en la Alpoj. La bildojn fotis geedzoj Pásztor.



/Kor.d-ro I. Ferenczy/

### **D-ro Ferenc Jáki estas naŭdekjara**

Ĝoje ni informas vin, ke je la 16a de novembro en 2009, 90-jaraĝis nia altestimata sinjoro instruisto d-ro Ferenc Jáki; la „Kavaliro de Kulturo kaj la Grand-ambasadoro de la Paco.” Li alproprigis la lingvon esperanto, de la mondfama majstro de la esperanto literaturo kaj poezio: Julio Baghy. Julio Baghy estis individua teatra aktoro dum 1921 en Miskolc, poste li multfoje gvidis esperanto lingvokurson en nia urbo Miskolc. D-ro Ferenc Jáki same gvidis multajn antaŭpreparajn lingvokursojn al la bazaj, mezaj, altgradaj esperanto ekzamenoj. Tiujn-ĉi lingvokursojn ankaŭ mi partoprenis en la tempo inter la jaroj 1964 kaj 1973j. Dum tiuj mi povis ekkoni lian tre grandvaloran individuon, altgradan klerigecon, lian veran homecon. Ni gratulas al la poeto kreanta kaj esperantlingve kaj hungare, okaze de lia 90a naskiĝtago, kaj ni deziras ankoraŭ multajn jarojn plejplenajn ĝojo kaj bona sano. Nun, ni prezentas lian belan poemon por vi legantoj:

sinjorino Adri Pásztor

**Ferenc Jáki**  
**Himno al Semo**

Stultaj poetoj, vi la floreton, ho, ne priploru!  
Ne, ĝi ne mortas, nur la petaloj falas surteren,  
kaj dum somero kreskas mistero en dolĉa sino,  
jen, en la frukto kaŝas futuron ĝi en la grajno.

Pri tritikkampoj, portantaj grajnoj sonoru kanto,  
sonoru kanto per grajnoj ĉe flava helianto,  
kaj kiam falas glanoj de kverko, kaj la kaŝtanoj,  
grajnoj kaj fruktoj kaj terproduktoj, al vi omaĝo!

Pomoj, persikoj, morusoj, framboj, migdaloj traŭboj,  
fruktoj de ruĝaj rozberoj, bluaj nigraj pruneloj  
gardas la semojn dum frosta vintro por la estonto,  
kiam printempe pro la sunbrilo ŝaŭmas la Vivo!

En la infero gaje donas vivsignon la tero,  
kaj herediĝas en ĝi ni mem ĝis fino de l' mondo.

Gardu la mondon kontraŭ nuklea, murda eksplodo,  
ke ne estingu nian futuron „atomfantomo”!

/Kantante Vivi: Poemoj kaj Art-tradukoj- Szolnok 2006/

**Elek Benedek**

*(fabelo)*

**JOHANO FORTA**

Ĉu estis, ĉu ne, vivis iam trans sep montoj kaj maroj, eble laman paŝeton malpli for malriĉa virino kun sia plenkreskinta filo, sentaŭga nenifarulo. La malfeliĉa virinio tage-nokte ŝpinis, teksis, ŝiaj manoj kaj piedoj eĉ por momento ne haltis en peza, streĉa laboro, sed tiu plenkreskinta sentaŭgulo penduminda faris tute nenion, nur kuŝaĉis de mateno ĝis vespero en polvo, kaj mueladis polvojn el unu mano en la alian.

Ho, tre ĉagreniĝis la kompatinda virino, preskaŭ pereigis ŝin la profunda malĝojo kaj amareco. Kio fariĝos el ŝia ununaskita ido, kiam ŝi por eterne fermos la okulojn. Li ja estas tiel senhelpa, ja plej mallaborema inter mallaboremuloj, ke eĉ pretan manĝaĵon di-benitan li ne volas mem levi al la buŝo. Iun fojon ekparolas Johano, kaj demandas al sia patrino:

- Patrino, pri kio oni klakas tiel laŭte ĉe la najbaro?
- Oni konstruas domon, kara filo, tial oni martelas.

Kaj jen, vidu miraklon! Johano subite vigle saltleviĝas, tiel ke la okuloj kaj buŝo de la patrino restas malfermitaj pro la granda miro, kaj li diras al ŝi:

- Patrino, ankaŭ mi iros tien, eble oni havos utilon de mi.

Kiam li alvenas ĉe la domkonstruantoj, tiuj ĝuste penegas pri naŭ-klafta ĉevrono, sed ili havis nek forton, nek spiron sufiĉan por levi ĝin. Johano kunfrapas la manojn pro la forta miro, kaj krias al ili:

– Ĉu eĉ tiun iometon vi ne povas levi?!

– Forportu vin, vi, polvomuelisto – algrumblis lin iu homo –, alie mi metos vian kolon sub ĉi tiun trabon!

– Nu, nu! Ne tiel kolere, ja eĉ la duono (prefere la tuto) senutilas, kion vi manĝas, se vi eĉ tiun maldikan pajleton ne povas suprenmeti. Lasu min fari!

Ĉe tio li prenis la ĉevronon, kaj suprensvingis ĝin, kiel bastoneton.

Ne estas mirinde, ke Johano tuj ekhavis grandan respekton. Kie ajn oni konstruis, li estis plej unue invitata, li suprendonadis la plej pezajn laborojn, kaj perlaboris tiom da mono, ke li eĉ ne sciis, kion fari per ĝi, kien meti ĝin.

Ho, kiel ĝojis lia patrino! Ke ŝi havas tiel bravan filon. Ke li vivtenos ŝin ĝis ŝia lasta tago. Ŝi decidis viziti la vilaĝestron, por fanfaroni al li, ke lia filo estas tia kaj tia... Avara homo estis la vilaĝestro, neniam tenis serviston, tamen li pensis dungi Johanon por salajreto. Li nome ĵus aĉetis tre grandan, veproplenan terpecon, ĉi tiu forta junulo purigos ĝin al li. Li diras sian intencon al la virino. Ho, kiom ekĝojis tiu malfeliĉulino! Ŝi kuris hejmen, kaj sen malfruo kondukis Johanon al la vilaĝestro. La interkonsento estis pli ol rapide farita. La kontrakto tekstis tiel, ke la vilaĝestro provizos Johanon kaj lian patrinon per manĝo-trinko, vesto, kaj kiam li finos, li kromricevos ankaŭ paron da ŝurimenoj. Kaj ĉi tiujn oni eltranĉos el la dorso aŭ de la vilaĝestro, aŭ de Johano, laŭ tio, kiu unue ekkoleros la alian.

En la unua tago de la nova jaro aperis Johano ĉe la vilaĝestro, por komenci sian servon.

Matene de la sekva tago li ricevis nur apenaŭ iom da malvarma maizkaĉo, kaj oni diris al li, ke li elpelu la ŝafojn al la veprejo, sed ĝis vespero li ne hejmenvenu, kaj senveprigu sur la terpeco. Sed lia nutrosako aspektis tiel plata, kvazaŭ fulmo estus ĝin trafinta.

Tio ne multe ĉagrenis Johanon, li elpelis la ŝafojn, cedis ilin al la propra emo, por ke ili paŝtu sin laŭplaĉe, kaj li mem kolektis sekajn branĉojn, kaj faris tiel fajnan fajron, ke ĝiaj flamoj lekis la ĉielon. Kaj kiam la fajro ruĝis bele ardante, li kaptis du ŝafojn, senfeligis kaj tiris ilin sur taŭge malmolan rostilon el kverko, fritis ilin ruĝe kraketaj, kaj tiom li satmanĝis, ke eĉ kun la reĝo li ne estus ŝanĝinta oficon.

Ĉirkaŭ vespero li bonorde returniĝis kun la ŝafoj. Kiam li alvenis hejme, demandas lin la vilaĝestro pri la senveprigado:

– Kiel vi progresas pri la senigado, Johano?

– Mi, por diri la veron, senigis la tutan – respondis Johano.

– Ĉu la tutan? Kion vi senigis tute?!

– Du buntajn ŝafojn – je ilia felo. Ĉu vi eble koleras, vilaĝestra moŝto?

– Ne, tute ne, kial mi kolerus?! Bone vi faris. Faru tiel ankaŭ alifoje, se mia edzino nenion metos en vian sakon!

La vilaĝestro abunde tradraŝis sian edzinon pro tio, ke per sia avareco ŝi kaŭzis al li tiel grandan damaĝon, kvankam estas ja prave: li mem ordonis al ŝi, nenion meti en la sakon; sed ne troviĝis aliulo, kontraŭ kiu li povus elverŝi sian koleron.

Tiel do forpasis la tuta vintro. Kiam printempigis, la vilaĝestro eliras, por observi, kiom Johano progresas pri la senveprigo.

Ha, Dio ĉiopova, eĉ arbusteto ne estis tie forhakita! Kaj Johano dormis apud la ŝafoj, kiel urso vintre. Vekas kaj skoldas lin la vilaĝestro, sed tiu lasas la vortojn preterorele, li nur demandas:

– Ĉu vi eble koleras, vilaĝestra moŝto?

– Mi tute ne koleras, eĉ iom ne koleras, vi, fripono, nur tenu vian dorson, por ke mi eltranĉu la ŝurimenojn, vi ja ne obeis la kontrakton!

– Se tiel, do tenu ĝin prefere vi, vilaĝestra moŝto, ja ankaŭ vi ne obeis la kontrakton. Eĉ gluton da manĝo vi ne donis al mia patrino, ankaŭ al mi nur fojfoje-maloŭte.

Lin mi ne povas superruzi, pensis la vilaĝestro, mi havos nur ĝenojn kun li, ĝis la terpeco estos senveprigita. Sekvatage la miro preskaŭ ŝtonigis Johanon, kiam li ekvidis, ke lian sakon pufigas granda, blanka pano, pecego da lardo, kazeo kaj eĉ brando.

Hm, li pensis, nun mi vere devas eklabori pri la senveprigo. Li komencis per hakilo, sed malrapide li progresis. Mi ne penegos tiel, li pensis, kaj forĵetis la hakilon, prenis la arbustojn per ambaŭ manoj, kaj tir-elŝiris ilin unu post aliaj, kiel virinoj kutimas fari pri kanabo.

Dum du tagoj li ĉion eltiris: arbojn, arbetojn, arbustojn, satureojn; poste amasigis ilin en tiel altan stakon, kiel la preĝejo, kaj bruligis fajron sub ĝi.

Ho, Dio ĉiopova, fariĝis tia fajrego, tiel grandega, ke eĉ vespere la ĉielo ne ŝajnis malheliĝi. Oni vidas la fajregon en la vilaĝo, ektimas la homoj: ha, ekbrulis la tuta mondo!

Oni alarmbatas la sonorilon, kelkaj prenas hakilon, aliaj sitelon, kaj kuras al la fajro, kvazaŭ brulus ilia propra domo. Nur kiam ili atingas la lokon, ili vidas, ke la veprejo de la vilaĝestro brulas, ne la tuta mondo.

Johano bonhumore ridegis, kaj la homoj, misagorditaj, hejmeniris. Matene la vilaĝestro demandas Johanon:

– Ĉu vi havas ankoraŭ multon por senveprigi, Johano?

– Eĉ herbeton ne, vilaĝestra moŝto.

– Kion vi do faris kun ili, kien vi forigis ilin?

– Mi forbruligis ilin ĝis la lasta peco. Ĉu vi ne vidis vespere tiun grandan fajron?

– Jes ja, mi vidis ĝin! Sed oni diris al mi, ke la najbara vilaĝo brulas, vi, fripono!

– Ĉu vi eble koleras, vilaĝestra moŝto?

– Mi tute ne koleras, eĉ iom ne koleras!

Kvankam li koleregis, preskaŭ li krevis pro tio.

Nun ne plu sciis la vilaĝestro, nek lia edzino, kion fari kun Johano.

Tage-nokte ili streĉis sian cerbon, kiel ili povus liberiĝi de li. Finfine la vilaĝestro tamen sukcesis ion elkovi. Li igis voki Johanon, kaj diras al li:

– Jen al vi nutraĵo por la vojo kaj tolaĵo, portu ilin en la arbaron al onklo Nikolao, kiu jam unu jaron forestas kun la porkoj, ĝis nun la kompatinda certe tute ĉifoniĝis. Se vi retrovos la porkaron, kune kun li hejmenpelu ĝin!

Ekiris Johano en la senfine grandan arbaron, por trovi la gregon, kiu fakte neniam ekzistis. Ja ĉiu saĝa homo povis dekomence konjekti, ke la vilaĝestro sendas Johanon en la arbaron, por ke iu sovaĝbesto pereigu lin tie.

Iris, iradis, vagadis Johano en la densa arbarego, traserĉis ĉiujn lokojn, kie la vilaĝestro indikis, ke li povos trovi onklon Nikolao, sed nenie li trovis lin, eĉ unu animon vivan li ne renkontis.

Li jam serĉadis dum unu semajno, kaj pesadis en si ĝuste, ĉu hejmeniri, por refoje demandi: kie kaj en kiuj lokoj kutimas pasi onklo Nikolao. Dum li tiel cerbumadis, konsideradis, li aŭdas laŭtan tumultadon, knaradon, ŝmacadon, manĝacadon, kvazaŭ porkaro paŝtus sin proksime.

Kaj vere estis tio! Granda grego da porkoj bru-trotas al li renkonte el la densaĵo, kaj post ili paŝadas granda, nigra figuro. Nu, certe la porkopaŝtisto.

Ekĝojas Johano, ke li tamen retrovis la porkojn de la vilaĝestro, li krias el la tuta gorĝo:

– He, onklo Nikolao, he, haltu via moŝto, mi alportis panon kaj puran tolaĵon! – Sed tiu nur paŝadas plu kaj murmuras. Urso ja estis tio, ne homo, tiel klare mi vidis, kvazaŭ hodiaŭ! Ĝi ŝteliris ĉirkaŭ la aproj esperante kapti iun el ili por vespermanĝo. Johano forte koleriĝis, ke onklo Nikolao eĉ unu orelon sian ne movas al li, li do alkuris kaj donis sonoratan frapon sur ĝia skapolo.

– Dio donu belan tagon, onklo Nikolao! Ĉu via moŝto eĉ por vorto ne haltas kun miaspeculoj?

La sinjoro vilaĝestro sendas puran tolaĵon, surmetu ĝin senprokraste, ja ĉio deŝiriĝis de vi!

Ektimas la urso, terurita li suprengrimpas arbon, kaj de supre murmuras al Johano.

– Ne faru ŝercon, via moŝto, venu malsupren de tiu arbo, kaj surmetu la ĉemizon!

Sed tiu ne movis sin, nur murmuris:

– Murr-murr-murr...

– Nenia „nur nun”, damnita murmurulo – suprenkriis Johano –, sed tuj, onklo Nikolao!

Ba, li povis paroli al tiu laŭplaĉe longe. Koleriĝis Johano, ho kiel tre, kaj en sia kolero li tir-elkaptis la arbon kun ĉiuj ĝiaj radikoj tiel, ke ĝi brue sterniĝis sur la tero kune kun onklo Nikolao.

Laŭte ĝemis onklo Nikolao, kaj en sia doloro li blekis tiel amare, ke resonegis la tuta arbardenso.

– Mi ja diris, ĉu ne, ke ne faru ŝercon? Vi batiĝis, ĉu ne? Do bonvolu surmeti tiun ĉemizon, nu!

Onklo Nikolao nun vere ne plu ŝercis, sed stariĝis sur ambaŭ piedoj, kaj regalas Johanon per tiel sonora vangofrapo, ke tiu vidis nurajn verdon kaj ruĝon.

Sed nun ankaŭ Johanon forlasis la milda pacamo.

– Murr-murr! – regrumblis daŭre onklo Nikolao.

– Nun, nun, ja prave, surmetu via moŝto tiun ĉemizon, alie mi ŝvit-dancigos vin! – alkriis lin Johano.

Nu, li povis krii, paroli al tiu bele aŭ aĉe: kvazaŭ al muro; onklo Nikolao nur murmuris, murmuradis, kaj frapis la vangojn de Johano de dekstre kaj maldekstre.

– Ĉu vi tiel?! Nu, mi montros al via moŝto!... – Kaj ĉe tio li prenis la ĉemizon kaj pantalonon, kaptis onklon Nikolaon firme en la manojn, vestis lin, eĉ frapis al li tiujn membrojn, kiuj ne obee fleksiĝis. Kiam li pretis kun la vestado, li prenis la brakon de onklo Nikolao, kaj kondukis lin, por hejmenpeli kun li la porkojn. Sed vane li klakigis al ili la vipon, neniuj iris tien, kien li volis, kaj se iun li hazarde trafis, tiu returnis sin, kaj minace grincigis kontraŭ li la dentojn. Kiam li vidis, ke tiel li ne nenien trafos, li detranĉis tri-klaftan branĉon el fago, kaj karesis per ĝi la flankojn de la porkoj. Tio vere efikis, nur unu terura apro turnis sin kontraŭ li, kaj kuris renkonte, por renversi lin.

– Haltu, porko – kriis al ĝi Johano –, aŭ tuj mi instruos al vi la morojn! – Kaj ĉe tio li tiel forte batis ĝin sur la kapo, ke ĝi senplie renversiĝis. Poste li transdonis ĝin al onklo Nikolao, por ke tiu zorgu pri ĝi, dum li kunpelos la aliajn.

Sed onklo Nikolao zorgis pri ĝi tiamaniere, ke li manĝis ĝin ĝis la lasta osteto, antaŭ ol Johano revenis.

– Vi povus lasi al mi almenaŭ la duonon – grumblis Johano –, sed ne gravas, nun helpu hejmenpeli la ceterajn!

Sed la urso nur murmuris:

– Murr-murr!

– Ne diru nur nun, diablo vin prenu, sed tuj! – kriis Johano, kaj frapis la urson tiel forte, ke tiu tuj ekiris.

Ĉirkaŭ vespero de la sekva tago ili feliĉe alvenis hejme.

Ha, Beata Maria, Sankta Jozefo! Apenaŭ la vilaĝestro ekvidis tiun maron da porkoj, li preskaŭ ŝtoniĝis pro la teruro. Johano, sen diri ion plian, fermis la porkojn en la fojnejo, unu li fritis al onklo Nikolao por vespermanĝo, poste li eniris al la vilaĝestro, kaj diris al li:

– Nu, vilaĝestra moŝto, mi hejmenpelis la porkojn, sed eĉ por nura aero mi ne dungus tian paŝtiston, kiel onklo Nikolao. Vane mi kompleksis al li, eĉ la puran tolaĵon trude mi devis surmeti al li, kvankam jam eĉ ŝnuro ne troviĝis sur li, ĉio forĉifoniĝis, krome li bezonis nek bonan molpanon, nek fajnan frititaĵon, li manĝas viandon krudan, kaj li sola glutegis unu tutan porkon. Kaj neniel li emis hejmenveni. Se mi estus en via loko, vilaĝestra moŝto, mi nepre ne plu tenus lin.

– Mi ne tenos lin, mia filo, neniel ja, forpeli lin, eĉ el la proksimeco de la vilaĝo – kuraĝigis lin la vilaĝestro, por iel liberiĝi de la urso.

Eliris Johano, prenis la urson je la orelo, elkondukis ĝin ekster la vilaĝon, kaj diris al ĝi:  
 – Jen ĉi tiu vojo dekstren, jen la alia maldekstren, onklo Nikolao, iru, kien plaĉas al viaj piedoj! – Ekiris tuj la urso, kuris rekte al la arbaro, kvazaŭ ĝi estus persekutata.  
 Nu – pensis la vilaĝestro – de ĉi tiu mi liberiĝis, sed kion nun mi faru kun tiu maro de aproj!?  
 Li venigis Johanon, kaj diras al li:  
 – Filo Johano, mi trovas, ke tiuj porkoj estas jam sufiĉe grasaj, buĉu ĉiujn morgaŭ matene!  
 Elitiĝis Johano en freŝa mateno, kaj unu post alia buĉis ĉiujn porkojn, poste li komencis brulsenharigi ilin. Ĝis mateno li foruzis ĉiom da pajlo, kiom la vilaĝestro entute havis.  
 Ĉi tiu diras al li, ke li iru al la distriktestro, kaj prunteprenu iom de li.  
 Johano foriris, kaj la distriktestro diras al li:  
 – Iru, filo, en la ĝardenon, tie vi trovos grandan stakon da pajlo, prenu al vi, kiom vi povas kunporti.  
 Johano eliris malantaŭen en la ĝardenon, levis unu randon de la stako, ŝovis sin suben, kaj ekiris kun la tuta pajloamaso. Sed ĉe la grajnejo li ne povis preteriri, li do demetis la stakon, iom flankenklinis la grajnejon, remetis la pajlon sur la dorson, kaj atinginte la dompordon, li kriis en la domon:  
 – Danke ni akceptas ĝin, distriktestra moŝto!  
 – Hej – teruriĝis la distriktestro –, haltu, fripono, ne forportu ĉiun pajlon!  
 Sed Johano eĉ orelon ne almovis, li forportis kaj forbruligis la tutan stakon.  
 De la aproj nun liberiĝis la vilaĝestro, sed ne de Johano.  
 Denove li elcerbigis ion, por pereigi lin. Troviĝis en la korto senfunde profunda puto sekiĝinta, kaj ĝi estis kovrita per tiel granda muelŝtono, ke eĉ dudeko da homoj ne povis formovi ĝin.  
 La vilaĝestro diras al Johano:  
 – Forĵetu ĉi tiun ŝtonon, kaj demetu la viandon kaj lardon en la puto, por ke ili ne malboniĝu!  
 Johano facilmove forpuŝis la muelŝtonon, malsupreniris en la puton, por demeti tiun multan viandon, kiun dudek kvar homoj malsuprendonadis al li. Dum kelka tempo ili etendadis al li la viandon, sed en certa momento la vilaĝestro ordonis repuŝi la muelŝtonon sur la puton.  
 Johano atendis, atendadis, por ke oni malsuprendonu la reston, sed kiam li vidis, ke vane li atendas, li ekiris supren, por vidi, kio okazas supre.  
 Apenaŭ li suprenvenis, lia kapo tuŝhaltis ĉe io peza. Li rigardas, kio ĝi estas, kaj vidas, ke oni remetis la muelŝtonon. Do bone – li pensis –, iom tro larĝan randon havas ĉi tiu ĉapelo, sed ĉiu ja salutas per tia, kian li havas! Li sekve ŝovis la kapon en la truon de la muelŝtono, kaj elleviĝis en la korton, deziris brandodoran, bonan matenon al la vilaĝestro. Li diras al li:  
 – Mi dankas por la ĉapelo, vilaĝestra moŝto, sed min ne ĝenas la suno ankaŭ, se mi ne portas tiel larĝandan ĉapelon.  
 Koleri konsumis la vilaĝestron, turmentis lin la penso, ke li fakte-vere ne povas pereigi ĉi tiun pendumindan friponon. Dum tiel pezis sur li zorgoj, li ricevas ordonon, ke aŭ li mem iru, aŭ sendu iun anstataŭ si en la armeon de la reĝo, ĉar oni devas militiri kontraŭ la francoj. Ekĝojis la vilaĝestro, ke nun li tamen liberiĝos de Johano. Li donis al li blankan ĉevalon, provizis lin per nutraĵo por kvar semajnoj, eĉ monon li aldonis, du dudekojn.  
 Kiam Johano jam sidis sur la ĉevalo, li demandas la vilaĝestron:  
 – Kaj kion propre oni devas fari en la milito, vilaĝestra moŝto?  
 – Nenion, filo, nur interbatiĝi.  
 – Nu, se nur interbatiĝi, tiam Dio benu vin, vilaĝestra moŝto, mi dankas por via bonvolo! –  
 Ekvojis Johano, kaj ne haltis, ĝis li atingis tien, kie oni batalis. Ĝuste tiam interpafis sin plej kolere la du armeoj. Li saltis de la ĉevalo, ligis ĝian kapon al ĝiaj piedoj, faris fajron, prenis la sakon, metis poton da akvo super la fajro, kaj kiam la akvo ekbolis, enŝutis maizfarunon. Kaj dum la faruno plej vigle kuiriĝis, bolis, la malamiko komencis pafadi al la fajro, kaj granda kanonkuglo falis tujapude al Johano.

– Ne pafadu ĉi tien, he –, alkriis Johano –, ja homoj estas ĉi tie!  
Sed la malamiko ne multe aŭskultis Johanon, kaj kanonkugloj, fusilkugloj faladis ĉirkaŭ li, kiel printempa pluvego.  
Denove krias al ili Johano:  
– Mi ja diris, ne ĵetadu, ĉar se vi trafos min, aŭ rompos mian kuirilon, vi amare pentos tion. Li ankoraŭ ne finis siajn vortojn, kiam kanonkuglo fortrafis lian kuirilon kune kun la fajro kaj ĉio apartena, kvazaŭ neniam ili estus tie. Nun al Johano jam vere trosufiĉis la ŝerco, li saltleviĝis el sia kuŝo, tir-elkaptis junan kverkon el la tero, kaj kontraŭiris kun ĝi la malamikon, batis-draŝis kaj tiel disŝutis ilin, ke kelkaj forkuris, aliaj mortis; eĉ unusola soldato ne restis surloke.  
– Mi ja diris, ĉu ne?! – diris Johano, kiam finiĝis la impeta atako. Kaj li reiris, refaris la fajron, kaj kuiris al si tian maizkaĉon, ke ĝia vaporo atingis la ĉielon.  
Dum li plej bonapetite kuleris la kaĉon, alvenas la reĝo. Li bele dankis lin, ke li liberigis la landon disde la malamiko, kaj tuj faris lin princo, krome donis al li edzine unu el siaj filinoj. Apenaŭ estis aranĝita la granda festeno, nuptofesto, Johano hejmeniris al sia vilaĝo, prenis kun si sian patrinon, kaj abunde prizorgadis ŝin per ĉio bona kaj bela ĝis ŝia morto. Ili eĉ nun vivas, se dume ili ne mortis.

Tradukis: Jozefo Horvath  
/Kontrolis: Jozefo Cziboly/

## **Memortabulo inaŭgurita honore al doktoro Kálmán Kalocsay, medicina profesoro**

La 13-an de decembro 2009 posttagmeze oni inaŭguris memortabulon honore al doktoro Kálmán Kalocsay, medicina profesoro, mondfama Esperanta poeto kaj tradukisto. La memortabulo estis metita sur la muro de lia iama loĝdomo (Budapeŝto, 2-a distrikto, strato Nyúl, n-ro 4) kadre de solenaĵo. En la nomo de la Hungaria Esperanto-Asocio Imre Szabó, la prezidanto salutis la ĉeestantojn, poste li dankis tiujn, kiuj agadis por la pretigo kaj lokigo de la memortabulo, por akiro de la diversaj permesoj. Inter aliaj d-ro Lajos Molnár, la prezidanto de la budapeŝta medicina Esperanto-fakgrupo, d-ro László Vértes, estrarano de la Hungara Medicinhistoria Societo kaj la aŭtoro de tiu ĉi informo ricevis laŭdon. Mallongaj prelegoj okazis pri la poeto kaj kuracisto Kálmán Kalocsay.

Kalocsay naskiĝis en jaro 1891 en Abaújszántó. Li registriĝis sin en la budapeŝta medicina universitato en 1909. Kun Esperanto li konatiĝis en jaro 1912. Post akiro de la diplomo (1916) li deĵoris en la unua mondmilito, kiel leŭtenanto. En la ĉefurba Hospitalo László li laboris inter la jaroj 1920 kaj 1966 ĝis sia pensiiĝo. Li akiris plurajn sciencajn titolojn, en jaro 1963 li iĝis titolita universitata profesoro. Liaj pluraj sciencaj artikoloj, faklibroj aperis pri la infektaj malsanoj.

En jaro 1921 aperis lia unua poemkolektaĵo sub titolo ”Mondo kaj Koro”. Pli poste aperis ankaŭ liaj pluaj aliaj volumoj. En siaj poemoj li prezentas ĉiujn homajn sentojn, la ĝojon, la doloron, la esperon. Tre grava estas ankaŭ lia tradukista agado. Artnivele li tradukis tri verkojn de Shakespeare (Reĝo Lear, La Tempesto, Somernokta sonĝo), de Goethe la

Romajn elegiojn, La Inferon de Dante. El la hungara literaturo li tradukis 130 poemojn de Petőfi sub titolo "Libero kaj amo" "Johano la brava", "La Tragedio de homo" de Madách, kelkajn verkojn de Géza Gárdonyi kaj Frigyes Karinthy.

Signifa estas ankaŭ lia lingvista agado. Lia lernolibro "Rendszeres esperantó nyelvtan" eldonita en 1966 multe helpas precipe al la lernantoj pretiĝantaj por la supera lingva ekzameno de Esperanto. La hungaraj esperantistaj medicinistoj kaj UMEA agadas por lokigi memortabulon honore al Kalocsay ankaŭ en la Ĉefurba Hospitalo László rekonante, ke li laboris 46 jarojn en tiu ĉi hospitalo, kaj li faris elstaran laboron ankaŭ kiel kuracisto.

D-ro Imre Ferenczy

### **Csokonai Vitéz Mihály**

/1773-1805/

Okaze de lia 205-a jardatreveno de la morto (la 5-an de januaro), nun ni rememoras pri Csokonai Vitéz Mihály [Ĉokonai Vitez Mihaj]; pri la granda hungara poeto de epoko de la klerismo.

Csokonai estis juristo, instruisto, lingvoreformanto, gazet-eldonanto, sed ankaŭ lia poezio postlasis gravan spuron en la hungara literaturo. Sur lia liro sentebla estas la efiko de Rousseau. liaj verkoj spegulas la staton de la hungara sociordo dum la jarcentŝanĝiĝo de la 18 kaj 19-a. Csokonai prijuĝis la malkleriĝon de la tiama noblara socio, ties izoliĝo for de la literaturo. Li batalis kaj politike kaj per literaturo por la kultura nivel-levigo de la hungara socio. En lian bonhumoran poemon: Dorottyá, (Dorotea) – temanta pri karnavala amuziĝo –, li enteksis la poetajn epokfidelajn bildojn pri la nobela vivformo.

El liaj tradukoj el fremdaj lingvoj la plej grava estas la libreto de „La sorĉfluto” de Mozart originale verkita de Emanuel Schikander.

Liaj ampoemoj spegulas la doloron de la nereciprokata amo, kaj montras la naturan belecon kaj senperecon de la popola poezio. Mi rememoras, kiam pasintjare en Széphalom ni vizitis la Muzeon de la Hungara Lingvo, tie mi povis vidi sur tabulo notite tiujn vortojn, kiuj eniĝis en nian belan hungaran lingvon, pere de lia lingvonoviganta agado. Pere de lia amikeco kun Ferenc Kazinczy, kaj de la lingvonoviganta movado estiĝis pli kompleta nia hungara lingvo.

El poemaro de Csokonai de d-ro Kolomano Kalocsay tradukitan poem-fragmenton ni prezentas nun al la kara leganto.

Sinjorino Adri Pásztor

**Csokonai Vitéz Mihály (1773-1805)**  
**AMKANTO AL LA ĈEVALIDFELA BOTELO**  
(fragmento)

Trezoreto kara, bela,  
Botelo ĉevalidfidela!  
Ho, mi por vi mortas, vivas,  
Pli ol kison vin soifas.

Se l' gojigan vangon blondan,  
Se l' kisindan buŝon rondan  
Mi liptuŝas, estas vana,  
La allogo de Susana.

Klakas sub la blonda krusto,  
Mia kor' en via brusto.  
Ho, ĉi bela buŝo via,  
Orĉeninda kol' gracia.

La talio ĉarmoplana  
Estas eĉ sen ost' balena;  
Ne, kiel la Manca tiu,  
Aŭ de...sed mi ne ekkriu.

Kaj hararo ĉarmoplana,  
Eĉ se ĉevalid-devena,  
Ne harar' de pendigita  
Homo, kiel pilk' de Rita.

Kaj la dolĉa kanto rida,  
Via kluko laŭkokida,  
Ho, ĉi kluko festas kanto  
Estas por mi korgojanto.

Se malĝojon mi ĝemetas,  
La konsolo en en vi pretas;  
Se mi ĝojas en feliĉo,  
Per vi venas ĝojpliigo.

Kaj se frostaj ventoj veas  
Vi agrablan varmon kreas;  
Kaj somer' velkige ardas,  
Vi agrablan freŝon gardas.

H ovin, se vi estas fore,  
Mi sopiras, vokas plore!  
Ekvidante vian ĉarmon,  
Mi faligas ĝojolarmon.

Vi survoje ĉiam kunas,  
Vin en lito mi brakumas,  
Post vekig' mi ĉiufoje,  
Vian amon kantas ĝoje.

(Kálmán Kalocsay: POSTRIKOLTO: Poemoj kaj Kantoj tradukitaj-Budapest-2004)



Karnavalo -Brazilio  
Liette Lela

### **Saĝaj pensoj**

Ne niaj kapabloj montras nian identecon, sed niaj decidoj.  
Ne faru tion al aliaj, kio ne plaĉus al vi.  
Dum la vivo ni ellernos plej malfacile, ke kiujn pontojn povas uzi, kiujn ne.  
Ne tio estas libereco, ke ni fareblas tion, kion volas, sed kion ni ne volas, tion ne devas fari.  
Vian vivon mezuru ne per via spiro, sed per tiuj momentoj, de kiuj ĉesas via spiro!  
Neniam forgesu: La sukceso portas amikojn, la malsukceso maldensigas ilin.  
La kontraŭargumentoj estas mensogoj por ni mem.


s-rino Helena Böde

### **Legindaĵoj** Ĉarlatanoj

Eble ankaŭ vi scias, ke en la tuta mondo estas tiuj homoj, kiuj anoncas: „Oni devas scii por vivi bone.” Sed tiuj homoj vivas el alies forto. Ili eluzas alies sencion. Ili estas ĉarlatanoj.  
Ni proponas por legi la nun eldonitan libron de profesoro de Universitato de Debrecen –, s-ro Attila Salga, kiu temas pri tiuj homoj. Laŭ ĝiaj ĝis nunaj legantoj, ĝi estas tre bona hungarlingva eldonaĵo. Titolo de la hungarlingva libro estas: Mi lenne velem nélkülem? (Kio okazus ĉe mi sen mi?)  
La aliaj hungarlingvaj, same bonaj libroj estas: A Reménygyújtogató (La ekbruligadanto de la Espero), kaj: Az ökörcsorda örökkévalósága (Eterneco de la Bovaro).

Kvankam la libroj aperis nur hungarlingve, ni esperas, ke la sekvonta libro de la aŭtoro aperos jam ankaŭ esperantlingve.

Pri aĉeteblecoj de la libroj la aŭtoro donas informojn:  
Attila Salga, salga1@t-online.hu



## Libro-raraĵoj

Ni ne sciis, kiom da homoj serĉis legendaron pri nia urbo por amuziĝi, por akiri konojn. Mi jam serĉis tiun ankaŭ plurfoje, sed ne trovis kaj konstatis malĝoje, ke legendaro ne ekzistas eĉ en la biblioteko „II. Rákóczi Ferenc” de nia urbo. Nun mi legis en iu miŝkolca tagĵurnalo (2010-01-04.), ke du aŭtoroj verkis legendaron pri Miskolc.

Piroska Csorba – Vilhelmo Fedor: Egyszer megjönnek a pillangók (Iam alvenos la papilioj) – Miŝkolcaĵ legendoj

Piroska Csorba: Miskolci séták (Promenadoj en Miŝkolc)

La populara muzikisto, kultura noviganto, Müller Péter Sziámi skribis pri tiuj libroj: „Se ĉiuj setlejoj skribus sian legendaron, tiam povus elformiĝi pli ŝatata Hungario”.

Laŭ nia opinio la efiko de la legendoj de nia loĝloko iĝos pli alloga kaj por la loĝantaro kaj por la vizitantoj.

Feliĉe estas, ke ĉi tiuj raraj libroj jam ekzistas. Mi gratulas al la verkistoj.

/La hungarlingvan hungarlingvan tekston de sinjorino Adri Pásztor, esperantigis sinjoro László Pásztor/Rev: Aleksandro Horváth-Lábatlan/

## Muzeo „Herman Ottó”

Pasintjare en decembro ni komencis komuniki la historion de la Miŝkolca Muzeo „Herman Ottó”, kiu estas en strato Papszer. Tiu konstruaĵo estis 110 jara en 2009, kaj estis tiutempe la sola kalvinana gimnazio de la urbo.

**La Miŝkolca Kalvinana Gimnazio komencis funkcii en 1560, kaj nuntempe portas la nomon de Gimnazio „Lévay József”, kaj ĉi-jare festas la 450-an datrevenon de sia fondiĝo.**

En la decembra numero aperis nur la esperantlingva traduko de la muzea prospekto. Nun ni komunikas de komenco ankaŭ la hungarlingvan originalon en la hungarlingva parto de nia revuo. La hungarlingva teksto kaj ĝia traduko aperas laŭ la Nro 411a eldonaĵo de Malgranda Biblioteko de Regionoj, Epokoj, Muzeoj, permesite de s-ro László Veress: direktoro de Muzeo „Herman Ottó”.

sinjorino Adri Pásztor



Statuo de Ottó Herman antaŭ la pri li prinomita Muzeo

## Miskolc

### La Muzeo Herman Ottó

- daŭrigo -

#### Urbhistoria ekspozicio

La ekspozicio prezentas la historion de la urbo en kvin ĉambregoj. La ekspozicio komenciĝas sur etaĝa koridoro de la tiama lernejkonstruaĵo. Sub la volbo lignoskulptaĵoj el la 18a jarcento akceptas la vizitantojn. Krom la fajne prilaborita Sankta Fratulo, la figuroj de bele restaŭrita eleganta Sankta Petro kaj Sankta Paŭlo prezentas elstaran valoron la eta, pentrita skulptaĵo „Senpekulino”. Apud la artaj portretoj de barokaj sanktuloj irante ni gvidas la vizitanton al unu el la plej famaj artaĵoj de la muzeo, la 14jarcenta gotika pordego el forĝita fero. Ĉi tiu per ladbendoj kradita klasikaĵo iam estis la pordego de la preĝejo de Rudabánya. El la fenestroj de la volbita koridoro ni videblas al la artobjekta Avaŝ-monta preĝejo, kies bele ŝtonkadritaj fenestroj kaj mezepokaj muroj servas kiel digna fono por la sendifekte restinta memoraĵo de la mezepoko.

**La unua ĉambrego** de la ekspozicio prezentas la historion de la urbo tra sep jarcentoj ekde la patrujokupo ĝis la fino de la turka epoko. Ankaŭ ĉi tiea historio de la hungara popolo – kiel tion pruvas arkeologiaj trovaĵoj de la esplorfosadoj de la Miŝkolca-aerodromo – komenciĝas ĉe la patrujokupo. Brustokrucoj de malkovrita tombo videblas sur fotobildoj. Tenilo de iu eksterordinara, el forĝita fero farita glavo kaj aliaj miŝkolcdevenaj uzobjektoj videblas en vitrinoj. Kopio de ĉarto el 1067 estas unu el niaj plej fruaj skribaj memoraĵoj, kiu mencias la vilaĝon /Hejőcsaba (hejoĉaba). Verko de Anonimo /ĉ. 1210/ rememoras kiel „Terra Miscoucy” /tero de Miskolc/ pri la loĝteritorio de la Borŝ-Miŝkolc-gento en la tempo de la patrujokupo. Pri la monaĥejo de benediktanoj de Tapolca informas nin unufoje la Ĉartaro de Várad (1219). La de riveroj Sajó, Hejő, Szinva limigita mezepoka vilaĝo ankaŭ en komenco de la 14-a jarcento apartenis al la plej multhomaj setlejoj en departamento Borŝod.

Reĝo Ludoviko, la Granda en 1365 akiras la proksiman fortikaĵon de Diósgyőr kaj ankaŭ Miskolc-on aneksis al la latifundio. Tiel anstataŭ la mezepokaj elitaj bienuloj reĝo Ludoviko, la Granda iĝis la mastro de Miskolc. La fortikaĵo iĝis reĝa loĝloko kaj Miskolc kiel apartenaĵo de la fortikaĵo komencis prosperi kaj ricevis aŭtonomion fine de 14-a jarcento. Inter objektoj de la reĝa vivmaniero ni trovas la el etaj ostoj faritajn sunhorloĝojn kaj iun 14. jarcentan skulptitan ikonfragmenton. Probable en la kastelkapelo servis reĝon Matiaso kaj lian kortegan popolon la kiel „ciborio de Diósgyőr” konata gotika dratemajla klasikaĵo. Pri la

konstruado de la kastelo memorigas la listela gotikapordofregmento, sur kiu suprenkurantanlacerton figuris la ŝtonskulptistoj laborantaj en la arbaroj de montaro Bükk. En la montaro Bükk funkciis en la 14-a jarcento eĉ du paŭlanaj monaĥejoj: en Diósgyőr kaj en Szentlélek. Ilin bildigas fotoj kaj diapozitivoj kaj inter la objektoj: korvo elforĝita fero, blazonbesto de la paŭlanoj. En la turka epoko ankaŭ Miskolc apartenis al la submetiĝintaj kampourboj. Inter la inde famaj metiartaj objektoj de ĉi tiu epokooni povas vidi: broditajn tukojn, kuprajn vazojn, armilojn: ponardoj, mallongaj cimitarojn, jataganojn, kaj pafilojn. Krome videblas kopioj de leteroj, kiujn la paŝao de Eger skribis al siaj Miŝkolcaj subuloj, impostpagantoj

Komence de turka epoko la regantoj donis urbon Miskolc kaj la kastelon de Diósgyőr kiel garantiaĵon al la magnataj familioj. La novaj protestantaj terbienuloj kaj la en eksterlando lernintaj predikistoj kontribuis al tio, ke fine de la 16-a jarcento la religia, morala kaj kultura influo de la protestantismo atingis kaj konkeris la socion de la kampourbo. Ankaŭ la Avaŝ-monta gotika preĝejo, kiun oni konsakris omaĝe al Sankta Stefano, iĝis kalvinana preĝejo. En la vitrinoj de la ekspozicio tial ricevis lokon apud la kopioj de pandisdonaj pladoj de Avaŝ-monta kalvinana paroko la plej belaj, originalaj pecoj de la protestanta eklezia arto de la 17-18-a jarcentoj altaraĵo kun "sinjoreca brodaĵo", stankaliko, plado, kupra glaso farita per „ŝarka” cizelado, kupraj kruĉoj por la konservo de la altarovino. Ĉi tie estas eksponita ankaŭ la lukse bindita Károlyi /Karoli/- Biblio de la familio-Palóczy. En ĉi tiu ĉambro videblas unu el la plej valoraj trezoraĵoj de la muzeo, 17. jarcenta orienta tapiŝo, kiu iam ornamis same la Avaŝ-montan preĝejon. La rilataj diablidoj prezentas krom la kalvinana preĝejo kaj ties trezoroj ankaŭ la tiaman kalvinanan lernejon, kiu estis unu el la klerigaj centroj de departamento Borŝod.

- Daŭrigo sekvos -

## Ŝercoj

### La aŭdo

Iu homo iras al la orelkuracisto kaj plendas, keli malbone aŭdas.

- Kiam vi spertas tion ĉi? - demandas la kuracisto.
- Ekzemple, mi ne aŭdas mian tusadon.

La kuracisto preskribas kuracilon kaj donas la recepton al la homo.

- Ĉu mi aŭdos pli bone de tiu ilo, ol antaŭe?
- Ho, ne – respondas la kuracisto – sed vi tusos de ĝi pli laŭte, ol antaŭe.

## La eta malbono

La kuracisto ekzamenas iun mezaĝan sinjorinon. Li diras al ŝi la diagnozon.

- Via koro estas malforta, vi havas iomete koronariton kaj via EKG montras cirkuladan perturbon. Kiom jara vi estas?
- Trideksep!
- Hm, ŝajnaa al mi, ke ankaŭ pri la memorkapablo estas iom da problemoj...

sinjoro László Pásztor

## Vort-enigmo

Du viroj renkontiĝis la unuan fojon dum ili promenis en la strato. Sinjoro A demandis al Sinjoro B kiom da gefiloj li havas. Sinjoro B respondis, “Mi havas tri filojn kaj neniun filinon.” Poste Sinjoro A demandis al Sinjoro B kiom da jaroj la filoj havas. Sinjoro B respondis, “Fakte hodiaŭ estas la naskiĝtago de ĉiu filo. Se oni adicius iliajnaĝojn, la sumo estas dek tri. Kaj se oni multiplikus iliajnaĝojn, la produto estas la samo kiel la numero de tiu verda domo tie trans la strato.” Nun Sinjoro A rigardis trans la straton al la verda domo tie. Poste Sinjoro A konsideris dum kelkaj minutoj. Nun Sinjoro A diris al Sinjoro B, “Mi bezonas unu pluan indikon.” Sinjoro B do diris, “La filo plej maljuna ludas klarneton kaj, fakte, li povas ludi la klarnet-konĉertonde Mozarto.” Aĥa!”, ekkriis Sinjoro A, “kial vi ne diris al mi antaŭe, ke viaj filoj havas naŭ, du, kaj du jarojn?!” Kiel Sinjoro A kalkulis ĉi tion?

### Solvo:

Unue Sinjoro A kalkulis ĉiujn eblecojn, kie la sumo de la aĝoj estas dek tri. Poste li kalkulis la produktojn de tiuj aĝoj

Jen la tabelo:

#### Aĝoj Sumo Produto

1, 1, 11 13 11  
1, 2, 10 13 20  
1, 3, 9 13 27  
1, 4, 8 13 32  
1, 5, 7 13 35  
1, 6, 6 13 36  
2, 2, 9 13 36  
2, 3, 8 13 48  
2, 4, 7 13 56  
2, 5, 6 13 60  
3, 3, 7 13 63  
3, 4, 6 13 72

3, 5, 5 13 75

4, 4, 5 13 80

Ĉar sinjoro A scii la produkton de la aĝojde liaj filoj (ĉar li vidis ĝin sur la verda domo), li estus povinta scii la aĝojn per ĉi tiu tabelo. Li bezonis tamen fari alian demandon. Tio signifis, ke la produkto estas "36" ĉar "36" estas la sola produkto, kiu vidiĝas dufoje. La repondo de sinjoro B pri la klarnet-konĉertode Mozarto pruvis, ke almenaŭ unu filo devas havi plo ol ses jarojn. La aĝoj do estis 9, 2, kaj 2.

Barry Friedman

## Leteroj de niaj legantoj

„Gekaraj!

Mi unue devas sendi mian kondolecon por via amiko Batta. Mi jam konstatis ke al homoj kiuj estis esperantistoj, kiam mi diras la lastajn vortojn ĉe entombigo, la ĉeestantaj funebrantoj la unuan fojon eksciis pri tiu homo ke li/ŝi estis E-isto. Do, eble ĉe ni ni devus pri homoj paroli kaj estimi ilin dum ilia vivo.

Okaze de la festotagoj mi same deziras al vi, unue sanon, ĉar ni povas agadi nur ĝis kiam ni havas sanon. Ĉirkaŭbrakon al vi. Tereza Kapista

Ps. mia lando post 20 jaroj estas liberigita de vizo bezono, ĉe ni oni diras "Blanka Schengen" Okaze de tio mi verkis etan rakonton kaj mi alsendos, anstataŭ bildo en alia mesaĝo.

## La vizo

Estis la jaro 2004? Mi ricevis invitilon por gvidi kurson dum tradicia Somera kursaro en Aŭstralio, Melburno. Mi ĝojis pro tiu invito ĉar mi ankoraŭ ne estis en Aŭstralio. Mi iris al ambasadejo pro la vizo. Tie estas ĉio bone organizita. Sur la muro estas aparato el kiu oni eltiras ordan numeron kaj poste en salono kie estas la giĉetoj vi povas traktote sidi ĝis kiam super la giĉeto aperas via numero, tio signifas ke via afero estos traktota. Intertempe vi plenigas la demandliston kiu estas en angla lingvo. Apud mi sidis homo tre strange vestita en sandalo kun ege malnovmoda leda teko. Li interparolis kun virino sidanta apud li. Li fanfanoras ke jam 30 jaroj li vivas en Aŭstralio kaj nun venis rekonstrui la malnovan domon en sia vilaĝo. La virino petis lin ke plenigu al ŝi la demandliston ĉar ŝi ne komprenas la anglan. Li respondis:

- Ho! Mi ne scias skribi en la angla, nek povas plenigi la demandilon ĉar mi ne povas ĉion kompreni. Tiam mi enmiksiĝis demandante:

- Ĉu eblas ke dum 30. jara vivo en Aŭstralio vi povas nek skribi, nek legi, eĉ ne ĉion kompreni en la angla?

- Jes, eblas, mi laboras en fabriko kie mi sidas ĉe maŝino per kio mi faras najlojn. Estas granda bruoj en tiu loko kaj la kunlaborantoj ne povas interparoli. Poste kiam finiĝas la labortempo, mi havas aŭton kaj iras rekte hejmen, ekster la urbo, ĉar mi la aŭton ne kondukas tra la urbo. Ĉu vi ankaŭ vojaĝas al Aŭstralio? – li turniĝis al mi.

- Jes, mi gvidos tie kurson de Esperanto kaj restos dum 2 semajnoj.

- Ho, kara ne revenu, mi tuj povas ĉi tie en la ambasadejo subskribi al vi garantian leteron, ke mi prizorgos vin, kaj vi poste venu al mi, estu mia edzino. Mi ne estas ege postulema, mi

estus kontenta nur se vi ĉiutage atendos min kun io manĝebla per kulero. Mi ŝatas la kuiritajn manĝaĵojn. Vi nenion devas labori, vi estos en domo, mi iros al laborejo kaj post reveno ni pasigos la vesperojn kune.

Mi estis vere ŝokita! Tamen afable mi trankviligis lin, ke mi tion ne povos fari,

- sed eble tion vi proponu al sinjorino apud vi

-Ne, ŝi ne scipovas la anglan.

Do, anstataŭricevi la vizon mi ricevis bonan okazon edziniĝi eĉ al eksterlandano! Kia ŝanco! En tiu ŝoko mi ekvidis mian numeron ĉe giĉeto kaj alkurante ĝin, tute ne sciis kion diri. Mi montris miajn paperojn kaj la invitleteron kaj ili ĝentile diris ke mi venu venontsemajne., Mi rehejmiĝis kaj tiam denove legis miajn dokumentojn kaj konstatis ke mi devas estis en Aŭstralio post 8 tagoj. Mi tiam vidis ke tio tute ne eblas ĉar mi ne povos atingi Melburnon ĝustatempe, se mi devos atendi pluan unu semajnon pro la vizo. Mi skribis al Aŭstralia Esperanto Ligo, ke bedaŭrinde mi ne povos esti ĝustatempe tie pro la vizo. Kaj la mirakla komputilo! Samvespere mi ricevis mesaĝon ke mi morgaŭ iru al la ambasadejo kaj estas ĉio en ordo. Kiel eblas? Ĉarla prezidanto de AEL estas eksa Ministro por eksteraj rilatoj en UN-o Ralph Harry.

Tuj matene mi iris tien, sed ili nenion scii pri mia vizo. Nature mi aliris la saman giĉeton kie hieraŭ mi estis. Mi ekŝvitis. Tamen, mi ne sukcesos! Tute hazarde aŭdis mian nomon la juna oficisto de apuda giĉeto. Alvokis min kaj donis al mi la pasporton kun la vizo kaj eĉ diris ke mi ne devas pagi la vizon (kio kostis 100\$).

Mi do, denove ankaŭ kun ŝoko eliris el la ambasadejo. Hejme mi malfermis la pasporton kaj konstatis ke mi ricevis OFICIALAN VIZON por oficiala vojaĝo. Mi ne povis kredi. Mi jam estis en multaj landoj sed tio ne okazis. Poste mi informis AEL ke mi ricevis la vizon, kaj ke la flugbileto kostas ĉ. 1000\$. Ili tute leĝere respondis:

-Vi pagu kaj ni repagos ĉi tie la sumon al vi.

Ho, Dio, de kie mi povus havi 1000\$ en tiu krizo, kiel emeritulo kun 80\$

Denove la komputilo estis la sola helpilo, mi skribis al ili:

- Kvankam nun mi la vizon havas, sed monon absolute ne havas por la flugbileto, nek konas iun ajn, kiu povus pruntedoni al mi. Tiu alta sumo estis, neimageble en tiu periodo ĉe ni. Post 1 tago mi ricevis telegramon ke mi iru al banko, ĉar alvenis pere de Wester Union mono al mi. Mi ne kredis ke tio eblas. De la poŝtejo mi rekte iris al avioagentejo kaj aĉetis la bileton, kaj post 2 tagoj mi forflugis al longegavojaĝo, al alia flanko de la mondo Kiam mi alteriĝis en Melburno mi timegis ke tiu mia vizo de *oficiala vojaĝo* ne estu suspektinda. Sed por oficialaj vizitoj ekzistis tute alia eliro kaj neniu rigardis min, nur onistampis la pasporton kaj salutis min. Tamen kiam mi atendis mian valizon, alvenis vere eta hundo kaj flaregis mian mansakon. Post ĝi alvenis sinjorino kaj petis ke mi malfermu la pakaĵon. La hundeto sursaltis kaj komencis elfosadi ĉion per la antaŭaj piedoj ĝis kiam ĝitrovus paperan sakon kun duon kilogramo da sekaj figoj. La sinjorino montris al mi la informilon kiun oni enmetis en la pasporton ĉe nia flughaveno. Estas klara indiko ke neniun manĝaĵon kaj lignajn objektojn, semojn ktp. oni rajtas enporti. Ŝi montris al mi la klaŭzon, kie estas indikita la punsumo kiun oni devas pagi se estas trovita io malpermesita ĉe la vojaĝanto. Ŝi petis mian pasporton kaj kiam vidis la vizon por oficiala vojaĝo, ŝi kun agrabla rideto redonis la pasporton, forprenis la figojn, kaj forgesis pri la puno. Ĉe flughaveno atendis min s-ro Kanaĉki, serbo, kiu vivas tie jam pli ol 50 jarojn. Li estas kunlaboranto en radio elsendo 3ZZZ kiuj elsendadas en Esperanto. Tio estis agrabla surprizo. En la kursejo mi persone konatiĝis kun s-ro Ralph Harry. Tre agrabla homo, mi dankis por lia interveno ĉar sen ĝi mi tute ne povus veni.

Hodiaŭ la 19an de decembro estas la tago kiam Serbio akiris la senvizan liberigon. Do, mi ĝojegas kaj ne plu havos okazon havi oficialan vizon.

PS: mi havas kelkajn pasportojn plenplenajn de vizoj, ĉar ni devis havi ne nur vizon por la vizitota lando sed ankaŭ transirajn vizojn tra aliaj landoj. Mi preskaŭ ne kredas ke tiuj longega vicstaro kaj ĉiama timo, ke eble oni ne ricevos la vizon, pasis.

Tereza Kapista”

## „46-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET- 46)”

### Informilo

Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni vicajn ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn la 46-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET- 46).

CELOJ kaj TASKOJ: studi problemojn de Esperanto-movado, elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn de Esperanto-agado, interŝanĝi sperton pri esperantista laboro, perfektigi en Esperanto, enhavore pasigi la tempon. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio. BET- 46 estas dediĉata al 35-jariĝo de litova urbo VISAGINAS.

LOKO: BET-46 okazos en orientlitovia urbo VISAGINAS, kiu situas 150 kilometrojn for de litovia ĉefurbo Vilnius proksime de landlimo kun Belorusio. En la urbo loĝas 30000 loĝantoj de pli ol 40 naciecoj, do, ĝi estas multnacia urbo. Ĝi okupas 896 hektarojn de areo, el kiuj preskaŭ duono estas belega pinarbaro. La urbo estas fondita en 1975 kaj estas la plej juna urbo de Litovio. Urbo situas sur bordo de lago VISAGINAS nur 6 kilometrojn for de fama Ignalina nuklea elektrocentralo, kiu ĉesos funkcii fine de 2009. La urbon de ĉiuj flankoj ĉirkaŭas belegaj regionaj kaj naciaj naturparkoj de Litovio. En la teritorio de urbo Visaginas kaj proksime estas 13 lagoj kaj lagetoj kaj ĉirkaŭe je 10 kilometroj de la urbo estas 110 lagoj kaj lagetoj de diversa grandeco. Tiu- ĉi regiono pro arbaroj kaj montetoj estas nomata Litovia Svislando kaj pro abundaj lagoj Litovia Finnlando. Blazono de urbo VISAGINAS estas arĝenta gruo sur blua fono. Tra VISAGINAS iras unu el la plej gravaj internaciaj fervojlinioj de Litovio (Sankt-Peterburg – Daugavpils – Vilnius – Varsovio - Berlino ). BET-46 funkcios en moderne kaj bonege ekipita Profesia studcentro pri teknologioj kaj entreprenado de VISAGINAS (str. Festivalio 7) , kie estas luksaj kondiĉoj por laboro de BET-46. Partoprenantoj de BET-46 libere povos uzi ĉiujn ejojn kaj servojn de la Studcentro (salonoj, aŭditorioj, la plej modernaj teknikaĵoj, muzikiloj, multaj komputiloj kun libera reta aliŝo, videoekipaĵoj por internaciaj forestaj konferencoj k.s.). VISAGINAS estas facile atingebla trajne, buse kaj aŭtomobile. BET-46 ĝuos ĉiuspecan helpon kaj kunlaboron de urba gvidantaro.

TEMPO: BET-46 funkcios la 26-an de Junio – la 4-an de Julio, 2010. Veni al la aranĝo eblas jam la 25-an de Junio.

PARTOPRENO: ni invitas ĉiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj ĉirkaŭ Balta maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj. La kvanto de partoprenantoj ne estas limigita.

ANTAŬ KAJ POST BET-46 estas ebleco laŭ moderaj prezoj aktive ripozi en proksime de VISAGINAS funkciantaj vilaĝaj altkvalitaj turismejoj kaj ripozejoj. Interesiĝantoj pri tio bonvolu aparte peti informojn ĉe Organiza komitato.

ALIĜKOTIZO: Ĝis la 31.12.2009: A) 30 lidoj por esperantistoj el Estonio, Latvio, Litovio.

B) 40 lidoj por esperantistoj el ekssovetiaj landoj.

C) 50 lidoj por esperantistoj el ekssocialismaj Eŭropaj landoj.

D) 60 lidoj por okcidentanoj kaj egaluloj.

De 01.01.2010 ĝis la 31.03.2010 aliĝkotizo por ĉiuj kategorioj kreskas je 15 lidoj ( do, 45, 55, 65, 75 lidoj ). Ekde la 01.04.2010 aliĝkotizo por ĉiuj kategorioj kreskas plus je 15 lidoj ( do, 60, 70, 80, 90 lidoj).

Infanoj, lernantoj kaj studentoj aliĝkotizon ne pagas. Pageblas en ajna konvertebla valuto. Unu eŭro egalas al 3,45 lidoj, la kurzo estas konstanta kaj ne ŝanĝiĝas.

ALIĜO: por aliĝi necesas plenigi aldonatan aliĝilon kaj sendi ĝin al Litova Esperanto-Asocio: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. Eblas aliĝi telefakse +370-37-228616 au rete al [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt) . Samtempe pagu aliĝkotizon. Aliĝiloj riceveblas ĉe LEA.

PAGEBLECOJ : 1) sendi poŝte al konto de kasisitino de BET-46 respondeca sekretariino de Litova Esperanto-Asocio Irena ALIJOSIUTE – SEB Vilniaus bankas, Konto Nr. LT44704406000134149 5, banka kodo 70440, BIC ( SWIFT ) – CBVILT2X.

2) Ĝiri al konto de Litova Esperanto-Asocio litv-s che UEA en Roterdamo, Nederlando.

3) pagi per kontanta mono en Oficejo de LEA en Kaunas, str. L.Zamenhofo 5 aŭ en ties filio en Vilnius.

4) interkonsenti kun Organiza komitato pri alia pagmaniero.

5) esceptokaze konsente de OK pagi surloke ĉe veno al la aranĝo, se ne eblas anticipa pago.

Aliĝkotizo ne estas repagebla. Aliĝo sen pago de kotizo ne validas (krom speciale interkonsentitaj kazoj).

LOĜADO: 1) en bonkvalitaj dulitaj kaj trilitaj ĉambroj en apuda komunloĝejo de la Studcentro (sur unu etaĝo estas kvar dulitaj kaj kvar trilitaj ĉambroj, komunaj duŝejoj, necesejoj kaj kuirejo por ĉiuj ĉambroj). Unu lito por unu tagnokto kostas 20 lidojn.

2) eblas mendi ĉambrojn en urbaj hoteloj. Prezoj estas proksimume 10-oble pli grandaj ol en komunloĝejo. . Hotelaj prezoj inkluzivas matenmanĝon. Interesiĝantoj petu pli detalajn informojn aparte.

3) laŭdezire por junularo eblos aranĝi amasloĝejon. Prezo anoncota.

Prezoj en komunloĝejo ne inkluzivas matenmanĝon. Pagu same kiel aliĝkotizon, dezirinde laŭeble pli frue, esceptokaze eblas pagi ankaŭ surloke veninte dum registrado.

MANĜADO: Estos organizita komuna tuttaga manĝado (matenmanĝo, tagmanĝo kaj

vespermanĝo) en manĝejo de la Studcentro. Bonkvali ta trifoja manĝado kostas 25 lidojn tage. Eblos organizi vegetaran manĝadon. En la sama konstruaĵo ankaŭ funkcios bufedo, kie eblos aĉeti manĝetaĵojn kaj trinkaĵojn.

Pagu same kiel aliĝkotizon, laŭeble pli frue, esceptokaze eblos pagi ankaŭ surloke veninte dum la registrado.

GRAVE: Esperantistoj, kiuj grave kontribuos al la programo de la aranĝo aŭ/kaj signife helpos organize, pro loĝado (krom hoteloj) kaj manĝado ne pagos.

PROGRAMO: tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en Baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, scienc teknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj tra la urbo kaj aliaj apudaj vidindaĵoj, diskutoj, forumoj, libroservo, interkona vespero, diservo, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero k.a..

Organiza komitato atendas proponojn, sugestojn, ofertojn por la programo, ankaŭ sinproponojn.

VIZOJ: al Litovio senvize rajtas veni civitanoj de ĉiuj landoj de Eŭropa Unio kaj de multaj aliaj landoj. Aliaj vizojn havigu en Litoviaj ambasadejoj kaj konsulejoj en diversaj landoj. En problemaj kazoj turnu Vin por helpo al Litova Esperanto-Asocio. Se necese, LEA povas sendi oficialan inviton.

ALIAJ GRAVAĴOJ: Fine de Majo, 2010 ĉiu aliĝinto ricevos Informilon Nr.2 kun pli detalaj kaj aktualaj informoj pri BET. Ni antaŭvidas eldonon de ĉiutaga gazeto dum la tuta periodo de la aranĝo. Aktualajn informojn pri BET-46 Vi povas trovi en retejo de Litova Esperanto-Asocio [www.esperanto.lt](http://www.esperanto.lt), informojn pri urbo VISAGINAS Vi povas trovi en retejo [www.visaginas.lt](http://www.visaginas.lt) ( bedaŭrinde nur en litova, rusa kaj angla lingvoj), informojn pri Studcentro de VISAGINAS Vi povas trovi en retejo [www.vpm.lt](http://www.vpm.lt) (nur en litova lingvo ).

ALIĜ-KONTAKTADRESO: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Stratadreso de LEA estas: str. L.Zamenhofo 5, LT -44287 Kaunas, Litovio. Poŝtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 kaj +370-686-69875 . Telefakso estas: +370-37-228616. Retadreso de LEA estas: [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt) ; [pjedorovas@takas.lt](mailto:pjedorovas@takas.lt) kaj [irenaa@takas.lt](mailto:irenaa@takas.lt) .

BONVENON AL LITOVIO !

Organiza komitato

## La granda rusa komponisto Pjotr Iljiĉ Ĉajkovskij

*Ĉi-jare estos la 170-jara datreveno de naskiĝo de fama rusa komponisto  
Pjotr Ĉajkovskij*

La granda rusa komponisto Pjotr Iljiĉ Ĉajkovskij naskiĝis la 25-an de aprilo 1840 en la malgranda apuduzina urbeto Votkinsk, Udmurta Respubliko, Rusio.

La gepatroj de estonta komponisto estis mirinde harmonia kaj feliĉa geedza paro. En ilia hejmo ĉiam regis la etoso de amo kaj reciproka estimo. La patro Ilja Petroviĉ laboris kiel estro de feroproduktanta uzino. Li havis profundajn teoriajn kaj praktikajn sciojn kaj neordinarajn aferajn kvalitojn. La patrino Aleksandra Andrejevna, finstudinte peterburgan orfan instituton, ricevis bonan kleron. Ŝi posedis du fremdajn lingvojn, bone komprenis muzikon, nemalbone ludis pianon kaj agrable kantis. En la domo-muzeo en ĉefa salono ankaŭ hodiaŭ staras fortepiano “Virta”, kiu plenigis per siaj ravaj sonoj la domon de Ĉajkovskij.

Denaske ege impresiĝema al muzikaj sonoj malgranda Peĉjo tutanime sin tiris al la patrino. Nome ŝi estis la unua, kiu alkondukis lin al piano, kiun Peĉjo infanece forte ekamis. Ĉiufoje finludinte li kisis “sian amikon”, tiamaniere esprimante sian senton. Tamen baldaŭ lian atenton allogis alia muzika objekto – orkestrino – mekanika orgeno, dank’al kiu muzikaj kapabloj de Peĉjo estis rimarkitaj flanke de ĉiuj. Estante kvinjara infano, Pjotr estis eltrovanta pere de fortepiano melodiojn – fragmentojn el operoj de Mocart, Rossini kaj de aliaj famaj komponistoj, kiuj estis registritaj sur la ruloj de la orkestrino. La knabo evidentigis tian pasion al muziko, ke oni malpermesis al li sidi ĉe la muzikilo dum tutaj tagoj. Tiam li komencis frapeti ritmojn per ĉio, kio trafis sub iliajn manojn, kaj foje li tiom entuziasmiĝis pri plenumado sur la fenestra vitro, ke li frakasis ĝin kaj vundis la manon. La evento havis pluson – ĝi servis preteksto por inviti la unuan instruistinon pri muziko. Tiu estis Maria Markovna Loginova (Palĉikova). Ŝi ne havis grandan tiurilatan scion, sed ŝi sukcesis instrui malgrandan Peĉjon ludi uzante muziknotojn. Ŝi estis kvieta kaj modesta persono el servutuloj, kiu, kiel ŝi mem konfesis, studis skribi-legi “kontraŭ kupra mono”. Post multaj jaroj, kiam ŝi spertis mizeron, Pjotr Iljiĉ el ne tre sufiĉaj propraj rimedoj difinis al ŝi negrandan pension ĝis la fino de ŝia vivo.

De la patro estonta komponisto heredis admiran rilaton al arto, muziko kaj naturo. Ankaŭ de la patro li akiris neordinaran optimismon, mirindan laboremon, honestecon kaj plenan foreston de profitemo.

La tria persono, al kiu li spertis senton de sincera amikeco kaj infana amo, iĝis lia guvernistino, francino Fanni Djurbaĥ. Kvar kaj duono jarojn havis Peĉjo, kiam en la hejmo aperis Fanni. Estante 6-jara knabo, li jam tute libere legis france kaj germane. Li verkis belajn versojn, kaj Fanni nomis lin “le petit Pouchkine” (“malgranda Puŝkin”).

Tamen nek poezio, nek literaturo, nek historio, nek aliaj interesoj povis delogi lin porlonge de muziko. Ĉiam pli ofte oni vidis lin apud piano. Peĉjo komencis disponigi la tempon por propraj improvizaĵoj.

Aŭtune 1850 10-jaran Peĉjon oni veturigis en Peterburgon, kie li estis akceptita en faklernejo pri juroscienco. Dum libera tempo plej ofte oni vidis lin en muzika ĉambro, kie li improvizis.

Grandan rolon ludis la instruisto pri muziko, pianisto kaj pedagogo Rudolf Kjudinger, kiu rimarkis: “Sendube, liaj kapabloj estas elstaraj: konsterniga fajneco de muzikaŭdo, memorkapablo, perfekta mano...” Aparte konsternigis lin improvizoj de Ĉajkovskij: “... efektive en ili nebule estis sentata io ne tute ordinara”.

Nelonge lernis ĉe Kjudinger la estonta komponisto, sed influo de tiuj lecionoj estis granda. Pli poste Ĉajkovskij skribis: “Al tiu elstara artisto mi ŝuldas tion, ke mi komprenis, ke

mia vera inklino estas muziko. Nome li proksimigis min kun klasikuloj kaj malfermis al mi novajn horizontojn de mia arto”.

La okupoj kun Kjudinger aldonis al Ĉajkovskij certecon pri propraj fortoj. Unuafoje en sia vivo li aŭdacis surpaperigi sian unuan komponaĵon. Tio estis romano je versoj de Afanasij Fet “Mia genio”.

En majo 1859 Pjotr Iljiĉ finstudis en la faklernejo, ricevinte rangon de titulara konsilanto. Ĉirkaŭ kvar jarojn li laboris en departemento de jura ministerio. Ne ricevante kontentigon en cara servo, li senpacience atendis finon de “ĉeesta” tempo.

21-jara Ĉajkovskij komencis lerni en Muzikaj klasoj, fonditaj antaŭ unu jaro laŭ la iniciato de Anton Rubinŝtejn. La pedagogoj estis bonegaj.

En septembro 1862 en Peterburgo estis malfermita la unua ruslanda konservatorio, kies direktoro iĝis Anton Rubinŝtejn. Ĉajkovskij tuj studentigis kaj finstudis ĝin kun la plej alta distingo – arĝenta medalo.

En januaro 1866 Ĉajkovskij transloĝiĝis en Moskvon laŭ la invito de Nikolaj Rubinŝtejn – la frato de Anton Rubinŝtejn – kaj komencis instrui en muzikaj klasoj de Rusia muzika societo, kaj ekde aŭtuno de la sama jaro li iĝis profesoro de ĵus malfermita Moskva konservatorio, kies direktoro iĝis Nikolaj Rubinŝtejn.

En 1868 okazis la premiero de la Unua simfonio, kiun Ĉajkovskij nomis “Vintraĵ songoj”. Direktis Nikolaj Rubinŝtejn, al kiu estis dediĉita la simfonio. La premiero pasis sukcese.

Ĉajkovskij estis granda majstro en ĉiuj ĝenroj, en kiuj li kreis komponaĵojn. En decembro 1876 en Moskva konservatorio estis plenumita La Unua kordmuzikala kvarteto. Inter aŭskultantoj estis fama rusa verkisto Lev Tolstoj. Pjotr Ĉajkovskij skribis en sia taglibro: “Verŝajne neniam en la vivo mi estis tiom flatita kaj kortuŝita en mia aŭtora memamo, kiel kiam Lev Tolstoj, aŭskultante *andante* de mia Unua kvarteto kaj sidante apud mi superlarmis”.

Kelkajn tagojn antaŭ la nova jaro 1877 Pjotr Iljiĉ ricevas la leteron: “Diri al vi, al kiu admiro kondukas min viaj komponaĵoj, mi opinias nekonvena... Tial mi nur diros kaj petas vin kredi tion, ke kun via muziko oni vivas pli facile kaj pli agrable”. La korespondantino estis admirantino de lia kreado Nadeĵda Filaretovna fon Mekk, vidvino de milionulo. Tiu ĉi letero estis komenco de multjara korespondado kaj mirinda amikeco inter du homoj, kiuj neniam sukcesis vidi unu la alian.

En la jaro 1877 Ĉajkovskij ekhavis 37 jarojn. En la naskiĝtago, fordonante sin al rememoroj li ne povis ne rimarki en si grandajn ŝanĝojn, okazintaj dum lastaj kvin jaroj. Al sia malnova amiko li skribis: “... mi tre ŝanĝiĝis dum tiu ĉi tempo kaj fizike, kaj precipe morale. Gajeco kaj emo petoli tute mankas. Juneco ne restis eĉ je unu groŝo. La vivo estas terure malplena, enua kaj vulgara. Mi forte pensetas pri edziĝo...” Certe, Ĉajkovskij estis komprenanta, ke edziĝo ŝanĝos la tutan staton de lia vivo. Tio tre timigis lin kaj detenis de decida paŝo. Tamen... tute neatendite por si mem jam en fino de majo li fianĉiĝis. 29-jara fraŭlino konfesis al li pri sia arda amo. Sed li klarigis al ŝi, ke li sentas nenion krom simpatio kaj danko pro ŝia amo. Tiu fraŭlino, Antonina Miĵukova, siatempe finstudis pianan klason en konservatorio. Do antaŭstaris malfacila alternativo: aŭ konservi sian liberon, kiu valorus vivon de la fraŭlino, aŭ edziĝi. Li ne povis elekti la lastan. La edziĝo do okazis. Kaj tio estis katastrofo por Pjotr. Energia kaj firma kiel muzika aganto li estis senhelpa antaŭ la fakto de familia malfeliĉego: inter li kaj la edzino nenio estis komuna; el ĉiuj homoj la plej fremda homo por li estis lia edzino. Kelkajn monatojn Ĉajkovskij luktis kontraŭ tiu ĉi konscio, ne kredante al si mem, esperante je alkutimiĝo... Fine nervoj ne eltenis. Pjotr grave ekmalŝanis. La doktoro senhezite preskribis divorcon kaj plenan ŝanĝon de la medio. En la oktobro lia pli juna frato Anatolo urĝe eklibertempis kaj veturigis la fraton eksterlanden, en izolitan svisian urbeton Klarans. Loĝante eksterlande, Ĉajkovskij komponis Violonan koncĉerton, La kvaran

simfonion, la operon “Eŭgeno Onegin”. La kvaran simfonion la aŭtoro dediĉis al Nadeĵda fon Meĉk.

Printempe 1891 Ĉajkovskij ricevis inviton partopreni en muzika festivalo okazonta samtempe kun malfermo de nova koncertejo en Nov-Jorko “Karnegi-holl”. La komponisto entreprenis grandan koncertan vojaĝon. Laŭvoje li prezentis aŭtoran koncerton en Parizo, kvar koncertojn li faris en Nov-Jorko kaj po unu koncerto en Baltimoro kaj Filadelfio.

Post la premieroj de opero “Iolanta” kaj baletto “Ŝĉelkunĉik” Ĉajkovskij forveturis al Berlino kaj poste al Bazelo, en kiu li ekpensis intervidiĝi kun sia guvernistino Fanni Djurbaĥ. Ŝi loĝis tiam en Monbeljaro, Francio. Sciiginte ŝin perletere pri sia alveno, li, laŭ sia propra konfeso, “kun iu doloriga timo, preskaŭ teruro” atendis la rendevuon. Al li ŝajnis, ke li foriras “ĝuste en medion de morto kaj jam delonge alaperintaj de sur scenejo de la mondo homoj”. Kaj jen li estas en Monbeljaro. Fanni jam estas 70-jara, sed ŝi nemulte ŝanĝiĝis dum ilia 44-jara disiĝo, kaj li tuj rekonis ŝin.

“Ŝi akceptis min tiel, kvazaŭ ni ne vidis unu la alian nur unu jaron, kun ĝojo, tenero kaj granda simpleco” – skribis Pjotr al sia pli aĝa frato. – “Mi tuj komprenis, kial kaj la gepatroj kaj ni ĉiuj tre amis ŝin. Ŝi estas estaĵo neordinare simpatia, rekta, saĝa, spiranta per bonkoreco kaj honesteco”.

Antaŭ la reveno hejmen Ĉajkovskij deziris komenci kreadon de La sesa simfonio. La 10-an de februaro 1893 li skribas al la frato Anatolo:

“Nun mi estas plenigita per nova komponaĵo (simfonio), kaj al mi estas malfacile deŝiriĝi de tiu ĉi laboro. Ŝajne ĉe mi rezultas la plej bona el ĉiuj komponaĵoj”.

Pri la nova simfonio li komunikas ankaŭ al la frato Modest, kaj la 11-an de februaro ankaŭ al nevo Bob, al kiu li dediĉos tiun simfonion.

Post la premiero de La sesa simfonio al Ĉajkovskij restis vivi nur naŭ tagoj. La 21-an de oktobro li ekmalsanis kun diagnozo ĥolero kaj la 25-an de oktobro li forpasis...

Lia morto konsternis Rusion. La tuta Peterburgo partoprenis funebran ceremonion. Multaj miloj da homoj akompanis la ĉerkon de la homo, kiu tutan vivon sentis kaj opiniis sin solulo.

## Anstataŭ epilogo

Fanni Djurbaĥ zorge konservis la infanajn kajerojn de “adorata Peĉjo”. En tiuj estas du versaĵoj en la rusa lingvo – sinturno al Dio kaj preĝo por Rusio. Petro ankaŭ en matura aĝo restis kredanta kristano kaj kiel homo, kiu profunde respektis Rusion kaj sian malgranda patrujon. Dum infana aĝo estonta granda muzikisto skribis tiujn bonegajn liniojn:

“Mi loĝas en malgranda urbo, sed mi respektas ĝin kaj estos ĉiam respektanta ĝin, eĉ kiam mi estos en fremda tero. Tamen, Dio faru tiel, ke tio ne okazu!”

En tiu epoko Votkinsk estis muzika urbeto. Ilja Petroviĉ skribis al la edzino: “Ĉi tie en ĉiu angulo estas rondodancoj kaj balanciloj”.

Laboristoj loĝis pogrupo: homoj venintaj el la sama vilaĝo kune laboris kaj kune ripozis. Ĉiu grupo havis sian apartan anguleton por ripozo, kie sonis belaj kantoj kaj estis plenumataj kolorriĉaj dancoj. Estis popularaj boatadoj kun kantado. Super surfaco de la lageto disvastiĝis bravaj kaj liriko-intimaj rusaj kantoj kaj romanoj. Ĉion ĉi observis kaj aŭskultis malgranda Peĉjo, aŭ Pjer, kiel nomis lin hejmuloj. Beleco kaj melodia riĉaĵo ne povis ne tuŝi la animon de la infano. Ja infanaj impresoj ĉiam estas la plej fortaj kaj brilaj! Poste Pjotr Iljiĉ skribis:

“Mi ekde la infaneco mem estis trafenitita per neklarigebla beleco de rusa popola muziko”.

Rememoroj pri la infaneco, pri la domo en Votkinsk akompanis la komponiston dum la tuta vivo. De jaro al jaro lia memoro ĉiam pli kaj pli idealigis la pasintecon, kiam li estis feliĉa kaj ĉirkaŭita per zorgoj de proksimuloj. Rememoroj pri la infaneco iĝis bazo por muziko de “Porinfana albumo”, “Dek ses kantoj por infanoj”, baletoj “Ŝĉelkunĉik”.

“Nun mi havas planon kaj revon viziti Uralon” – skribis la komponisto, kiam li ekhavis kvindek jarojn. Sed efektiviĝi la revon li ne sukcesis. Verdire, unu jaron antaŭ la forpaso li tamen renkontiĝis kun la infaneco, sed – ve – ne en Votkinsk, sed en Francio, en Monbeljar, kie loĝis Fanni Djurbaĥ.

Pjotr Iljiĉ skribis: “Mi ne povas esprimi, kiom ĉarman sorĉan senton mi spertis, aŭskultante tiujn rakontojn kaj legante ĉi tiujn leterojn kaj kajerojn. La pasinteco kun ĉiuj detaloj tiom vige renaskiĝis en la memoro, ke ŝajne mi spiras la aeron de votkinska domo”.

*Bronislav Ĉupin*



## Gratuloj

Elkore ni gratulas al la **instruistino s-ino Ilona Sirko**, kiu instruas la lingvon Esperanto en du klasoj, de la **Gimnazio** pronomita pri la fama esperantista kuracista-profesoro **doktoro Kalocsay Kálmán**, kaj funkcia ekde 1a de septembro 2009a - en la niaregiona Norda hungaruja vilaĝo *Bercel*.

Elkore ni gratulas ankaŭ al la „**Julio Baghy Societo**” fondita de la Szeged urba Esperanto Klubo, kiu inaŭguris ĝin dum „Memortago pri Julio Baghy” kaj memnorekspozicio, la 13an de januaro 2010a.

Elkore ni gratulas ankaŭ la **kreanton de la „Kalocsay-memortabulo”** kaj la **organizantan grupon** de la memorfesto.

***Tutkore ni salutas kaj gratulas ĉiun virin-leganton de nia gazeto, okaze de la Internacia Virintago je la 8a de marto 2010a!***

La membraro de la Miŝkolc urba Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”





## **NORDHUNGARIA INFORMO**

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

*Tel.: + 36 70 206 1739*

*Tel.: + 36 70 570 8895*

*Tel.: +36 46 738 982*

Retpošto: [pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu](mailto:pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu)

Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>